La Nov-Jorkia
ESPERANTISTO
ISSN 2573-6108

Esperantumado en la Imperia Ŝtato
Volumo 2 Numero 1 Majo 2018

Okazos la 25a Aŭtuna Renkontiĝo de Esperanto

Tomaso Alexander, Esperanto-Klubo de Roĉestro

Esperantistoj de nord-orienta Usono kaj sud-orienta Kanado staras por la grupfoto dum la 24a Aŭtuna Renkontiĝo de Esperanto (foto de Neil Blonstein).

Kaj en Usono kaj en Kanado, 6-8 de Oktobro 2018 estas longa semajnfino. Pasigu ĝin en bela naturo kun buntaj folioj kaj aliaj esperantistoj—partoprenu en la Aŭtuna Renkontiĝo de Esperanto (ARE) ĉe Silver Bay.

ARE havas longan tradicion kaj 2018 estas nia 25-a jubileo. Ni atendas, ke tiu ĉi renkontiĝo estos la plej bona ĝis nun! Ĝi ofertas ne nur kutimajn prelegojn, ludojn, kaj esperantumadon, sed inkluzivas ankaŭ montan eksursadon, kajakadon, ŝovludadon, pafarkadon, kaj aliajn aktivaĵojn.

Ĉiun jaron revenas multaj fluaj parolantoj por prelegi, babili, ludi, kaj muzikumi, sed ARE estas ankaŭ bona renkontiĝo por novaj parolantoj ĉar estas klasoj por komencantoj kaj meznivelulo kun profesiaj instruistoj. Granda proporcio de la partoprenantoj venas el franclingva Kebekio, do jen ŝanco por uzi Esperanton por ĝia originala celo: paroli kun alilingvaj personoj el aliaj landoj.

ARE okazas ĉe la Silver Bay YMCA, familia konferencejo. Tranoktado ĉefe estas en bela kaj historia gastejo The Inn kaj inkluzivas manĝojn en la nova Boyd Center. Nova en 2018 estos nova kaj pli bela loko por la "junulara dometo" kie junuloj povas veni favorpreze kaj mem kuiri por ŝpari monon. Haveblas specialaj rabatoj kaj financia subteno por junuloj kiu tranoktas en la junulara dometo.

Por pli da informo pri ARE kaj por registriĝi, bonvolu viziti *are-esperanto.org*. Por informo pri rabatoj kaj subteno por junuloj, kontaktu min ĉe *salivanto@yahoo.com*.

Kolofono

La Nov-Jorkia Esperantisto raportas po du fojoj jare pri esperantaj eventoj kaj agadoj, kiuj okazas en la ŝtato Nov-Jorkio. Eldonas la gazeton la Esperanto-Societo de Sirakuso.

Redakcio
Timothy Boronczyk
Zerbie Hynson

Ne nepre kongruas la opinio de la societo kaj la enhavo de artikoloj. Sendu komentojn kaj proponojn retpoŝte al la redakcia teamo ĉe *novjorkio@syracuseesperanto.org.*

Aktuala kaj malaktualaj numeroj estas haveblaj senpage ĉe *syracuseesperanto.org/novjorkio.*

La kolofona bildo de la unua paĝo montras tion, kio restas de la Wesleyan Methodist Church en Seneca Falls. La preĝejo estis la gastloko de kongreso por diskuti la kondiĉojn kaj rajtojn de virinoj, kiu okazis la 19-an kaj 20-an de julio en 1848, kaj tiu kunveno estas rigardata kiel la komenco de la virina balotrajta movado. La tri originalaj muroj de la preĝejo staras en la bieno de la nuntempa Women's Rights National Historic Park. Foto de Kathleen Eilers.

Kaŝitaj Ŝtonoj Reklamas Esperanton

Kelly Buman, Binghamton Esperanto

Lastatempe ni pentris sur ŝtonoj por la grupo *Broome County Rocks*. Tiu grupo kaŝas specialajn ŝtonojn ĉirkaŭ la kantono Broome kaj invitas la loĝantaron trovi ilin. Homoj afiŝas fotojn pri ŝtonoj, kiujn ili trovas, en la paĝon de tiu grupo en Facebook kaj poste re-kaŝas ilin por ke aliuloj trovu ilin.

Cory Nedlik havis la ideon pentri sur la ŝtonojn por gajni intereson en nia nova esperanta grupo. Ĉiu ŝtono montras esperantan vorton, ilustraĵon, kaj nian nomon "Binghamton Esperanto". La vetero nun pliboniĝas pro printempo kaj ni planas kaŝi la ŝtonojn en parkoj, marŝpadoj, kaj aliaj publikaj lokoj. Espereble ni vidos niajn ŝtonojn afiŝitaj en Facebook!

La pentritaj ŝtonoj atendas sian kaŝiĝon (foto de Kelly Buman).

KER-Ekzameno Unuafoje en Novjorko

Raúl J. García, Esperanto-Societo de Novjorko

Ĉi-somere oni povos ekzameniĝi per la oficiala lingva ekzameno laŭ la Komuna Eŭropa Referenckadro (KER) por lingvoj, uzata en Eŭropo por ĉiuj lingvoj en Eŭropo, inkluzive de Esperanto. En Novjorko, la 16an de junio, eblos ekzameniĝi je nivelo B1, B2, aŭ C1. La limdato por aliĝi estas la 15a de majo, do aliĝu tuj se vi interesiĝas pri la ekzameno.

La ekzameno en Esperanto unue oficiale aperis la 31an de decembro 2008, en Eŭropo. Ĝi venis al Usono unuafoje en 2010 kiam okazis sesio en San-Diego. Ĝi okazis poste en San-Francisko en 2013, 2016, kaj 2017. En 2017 okazis ankaŭ sesio ĉe NASK. Ĉi tiu sesio estos la unua fojo en Novjorko.

Se vi ne sciis pri la KER-ekzameno antaŭe kaj ne sentas vin preta por la ĉi-jara ekzameniĝo, pripensu por la estonteco. Ĉi-jare eblos ankaŭ ekzameniĝi ĉe NASK, kaj kutime eblas ĉe la Universala Kongreso.

Aliĝu ĉe *edukado.net/alighilo?id=2018TU-USNO*. Se vi havas demandon, tuj sendu retmesaĝon al *rauljgarcia@gmail.com.*

Esperantistoj Pasigis Semajnfinon en Utiko

Ken Hynson, Esperanto-Societo de Sirakuso

Dum la semajnfino de la 21-a kaj 22-a de aprilo, la Esperanto-Societo de Sirakuso organizis senkrokodilan semajnfinon, du-taga renkontiĝo por enmerge ekzerciĝi en esperanta parolado. Entute dek kvar personoj venis al Utiko, Nov-Jorkio, de ses urboj trans la ŝtato. Esperantistoj venis de Roĉestro, Binghamtono, Platsburgo, Sirakuso, Skenektadio, kaj Novjorko por partopreni. Ĉiuj ĝuis la belan printempan veteron, kaj la spontanean amikecon, kiu okazas nature inter samideanoj.

Aperas en la foto Esperantistoj, kiu kunvenis en Utiko por Senkrokodila Semajnfino: Cory Nedlik, Dana Alexander, Kelly Buman, Tomaso Alexander, Ken Hynson, Zerbie Hynson, Jonathan Saunders, Phyllis Clark, Raúl García, kaj Basi García (foto de Kelly Buman).

Ni renkontiĝis je sabato ĉe Bagg's Square Cafe por nia unua gustumo de Utiko. Poste, ni promenis por rigardi la stacidomon Union Station. Tiu konstruaĵo estis konstruita inter 1910 kaj 1914 laŭ la italianta stilo de arkitekturo kaj ĝia interno estas bela kun grandegaj marmoraj kolonoj kaj arkaĵoj.

La sekva vizitloko estis The Munson Williams Procter Institute. En la muzeo ni rigardis multajn kreemajn artaĵojn. Ni rigardis ankaŭ la hejmon de la familio Proctor, kiun konektas longa koridoro al la muzeo.

Post enskribiĝinte en niaj hoteloj, ni vespermanĝis en la kafejo Tramontane Cafe. Mi opinias, ke ĉi tiu loko estas tiel unika kiel nia grupo. La unua tago en Utiko finiĝis ĉe la hotelo per sociumado kaj vigla konversacio.

Je dimanĉo, kelkaj grupoj de samideanoj renkontiĝis por matenmanĝo en la hoteloj. La suno denove brilis en blua ĉielo kaj la vertero estis perfekta por iri al la bestoĝardeno. La ekskurso estis pli ĝuinda ol mi atendis. Ĉiuj ĝuis vidi la bestojn kaj lerni iliajn esperantajn nomojn. Poste, ni tagmanĝis ĉe Cafe Hummus kaj adiaŭis.

Mi estas ĉiam pli kreskanta pro tiaj semajnfinoj ĉar mi havis oportunon paroli esperante kun aliaj homoj. Tio certe helpas lerni novan lingvon sed ne estas haveble al multaj en ilia hejmo. Do, mi alte aprezas tiujn spertojn.

Estas ankaŭ aliaj aferoj, kiujn mi lernas, kiujn mi ne povas lerni per hejmstudado. Ekzemple, dum tagmanĝo ĉe Cafe Hummas okazis bona diskuto pri kiel oni diras "french fries" esperante. Diri "fritoj" estas malĝusta, diris iu, ĉar "frit" estas verba radiko. "Frito" sekve devus signifi "ago friti". Tamen, alia opinias ke "fritoj" estis ĝusta ĉar multaj spertaj esperantistoj konsentis pri tio kaj tial la vorto troviĝas nun en la vortaro. Tian scion malfacilas memlerni. Do, ankau ĉi tiaj konversacioj helpas min.

Fine, mi volas diri, ke komunumo estas granda afero. Lerni novan lingvon ne facilas nur per hejma memlernado. Kompreneble, ni bezonas unu la alian por faciligi nian laboron, kaj okazoj viziti kun samideanoj inspiras min.

Seminario pri Aktivula Maturigo en Novjorko

Raúl J. García, Esperanto-Societo de Novjorko

Aperas en la foto: Rakoen Maertens (sinfotanto), Sara Spanò, Francesco Maurelli, Neil Blonstein, Ulrich Becker, Humphrey Tonkin, Robin Hill, Raúl J. García, Matt Weh, kaj ene de la cirklo Miko Brandini (foto de Rakoen Maertens).

La 27an de januaro ĉe 777 United Nations Plaza, Novjorko, okazis la 42a seminario pri Aktivula Maturigo (AMO). Sub la gvido de UEA-estrarano D-ino Sara Spanò, kaj TEJO-estrarano S-ro Francesco Maurelli kun helpo de S-ro Rakoen Maertens, la unu-taga seminario informis pri eksteraj rilatoj kaj kunlaboro kun aliaj organizaĵoj.

La temo de eksteraj rilatoj estas grava koncepto kompreni por aktivuloj en Esperantujo ĉar ni havas respondecon bone reprezenti nian agadon, kaj nian organizaĵon, ĉu lokan ĉu nacian ĉu internacian.

AMO-seminarioj ĉefe rilatas al trejnado pri konsciigo, kapabligo, kunordigo, kaj komunumo. Ĉi tiu seminario fokusiĝis pri konsciigo, kaj ni eniris en la klarigon de informado kaj eksteraj rilatoj, kaj kiel ili malsamas. Gravas memori, ke eksteraj rilatoj temas pri ambaŭdirekta rilato, kiu estu efika por ambaŭ flankoj. Donis konsilojn ankaŭ Humphrey Tonkin, kiu estas veterano en Esperantujo. Inter ili, mi mencios tri: estu serioza, ne estu ĝena, kaj estu helpema. Laŭ resuma vorto de ĉeestanto, estu alparolinda.

Kluboj

Binghamton Esperanto
facebook.com/groups/551200958567378
estro Kelly Bunman
tehkellymonster@gmail.com

Esperanto-Societo de Novjorko
esperanto-nyc.org
estro Miko Brandini
esperantosocietyofnewyork@gmail.com

Esperanto-Asocio de Platsburgo
facebook.com/pburghesperanto
estro T. Roberto Lyman
pburghesperanto@gmail.com

Esperanto-Klubo de Roĉestro
groups.yahoo.com/EsperantoRochester
estro Tomaso Alexander
salivanto@yahoo.com

Esperanto-Societo de Sirakuso
syracuseesperanto.org
estro Timoteo Boronczyk
mail@syracuseesperanto.org

Se ne estas grupo en via regiono, starigu iun kaj sciigu nin. Ni nepre listigos ĝin ĉi tie.

Kalendaro

Renkontiĝo de Binghamton Esperanto okazas preskaŭ ĉiusemajne ĉe Starbucks (Front St). Datoj estas anoncotaj.
facebook.com/groups/551200958567378

Komencanta konversacia renkontiĝo de la Esperanto-Societo de Novjorko okazas foje ĉe Espresso 77. Datoj estas anoncotaj.
meetup.com/EsperantoSocietyOf NewYork

Formala renkontiĝo de la Esperanto-Societo de Novjorko okazas ĉiumonate la trian vendredon (krom somere) ĉe 28 East 35th St.
meetup.com/EsperantoSocietyOfNewYork

Renkontiĝo de la Esperanto-Asocio de Platsburgo okazas foje ĉe Koffee Kat Espresso Bar. Datoj estas anoncotaj.
facebook.com/pburghesperanto

Renkontiĝo de la Esperanto-Klubo de Roĉestro okazas ĉiumonate la duan vendredon ĉe Starbucks (Center Pl Dr).
events.duolingo.com/rochester-esperanto

Renkontiĝo de la Esperanto-Societo de Sirakuso okazas ĉiumonate la trian vendredon ĉe Strong Hearts Cafe.
meetup.com/SyracuseEsperanto

Tutmonda Ekzamentago (KER) okazos la 16an de junio en Novjorko.
edukado.net/ekzamenoj/ker/sesioj

Paralela Universo okazos la 18an de aŭgusto.
facebook.com/groups/691599730978382

Esperanta Kurso ĉe Universitato de Roĉestro okazos dum la aŭtuna semestro.
esperanto.net/ur

Aŭtuna Renkontiĝo de Esperanto okazos la 7an ĝis la 9a de oktobro ĉe Silver Bay.
facebook.com/events/1935923370066866